

## Legantoletero



## Pri "Bibliotekoj kaj muzeoj" (SR 2/2003, p. 75-82)

Jam nun *EGS* en *Herzberg am Harz* posedas konsiderindajn diversspecajn materialojn. Grandparte ili devenas el nemalmultaj malavaraj donacoj. Nur malgranda parto tamen estas iom ordigita. En la jaro 2003 finfine ni volas komune komenci krei provizoran ejon kaj krude ordigi la tutan materialon, kaj elsondi resp. ŝanĝi inter duoblaĵoj ktp.

Tre gravas ankaŭ listigi la librojn por ricevi superrigardon. Al la nur parte ordigita materialo apartenas ekz. libroj, prospektoj, gazetokolektoj, diapozitivaj, diversspecaj varbiloj, afiŝoj, fotoj, film-materialo, vidbendoj (videoj), diskoj, ktp. Ni same provos komune klerigi la movadon i.a. pri literaturo, historio, muziko, moderna informado, instruado, ktp. Tio povos esti tre praktika koincido.

Ni kolektas ankaŭ materialon pri lingvistiko, interlingvistiko, kaj estonte krome ankaŭ pri aliaj lingvoj, ekz. lingvolernolibroj kaj vortaroj, (kompakt-)diskoj, fabeloj, famaj komikoj, kuirlibroj, ktp. La celo devas esti, ke Esperanto iom forlasu sian geton, tamen la daŭra organizado kaj posedorajto nepre devos resti en la manoj de respondecaj kaj seriozaj Esperanto-fakuloj.

Mi deziras al ni kuraĝon kaj sukceson por nia komuna projekto "Muzeo por Esperanto kaj lingvoj" de *Esperanto-Gesellschaft Südharz (EGS)* – kiu eble estonte fariĝos "La Interkultura Muzeo". Momente multe pli gravas la praktika helpado ol financaj rimedoj. Temas entute – en tiu ĉi fazo – pri vere nemalgrava kolektaro kaj en materiala kaj, eĉ multe pli, en nemateriala senco. Cetere la diversspeca materialo povos taŭgi por la praktikaj laboroj de la gestudentoj kaj Esperantolernantoj en Germanio kaj aliaj Eŭropaj landoj kadre de la "Esperantoklerigejo" en *Herzberg am Harz*.

Ankaŭ por literaturemuloj, sciencistoj kaj kreemuloj ni havos valorajn trezorojn. Ni esperas kaj klopodos, ke la kolektaĵo ne staru kvaŝaŭ kiel abstrakta materialo en iu senrilata muzeo. Por donacoj kaj praktika kunhelpado ni anticipe dankas.

Peter ZILVAR <zilvar@t-online.de>  
p/a Esperanto-Gesellschaft Südharz (EGS)  
Grubenhagenstrasse 8

DE - 37412 Herzberg am Harz, GERMANIO

## Kion cetere opinias la ISAE-anoj?

Ĉu ankoraŭ esperantigi  
la proprajn nomojn?

Mi ne disponas pri la necesa bibliografio por science diskuti la problemon de la propraj nomoj en Esperanto. Post *Wüster, Waringhien* kaj aliaj mi povas nur konsideri la solvojn videblajn en la praktiko de esperantistoj, precipe en la revuoj, kaj rilatigi tiujn solvojn al la traktado de la problemo en la modernaj naciaj enciklopedioj. Ĉar hodiaŭ, post tri jardekoj de la rimarkoj faritaj de *Waringhien* en la punkto C. ("La propraj nomoj"), p. XVI-XIX de la Ĝenerala antaŭparolo ĉe Plena Ilustrita Vortaro, *Paris 1977*, iuj aspektoj de la problemaro ŝajnas pli firme fiksitaj – kaj en esperantlingva praktiko kaj en la ekstermovada kulturo.

Ĉu la Akademio de Esperanto jam analizis post *Waringhien* la demandon kaj decidis – kaj kion? – pri la propraj nomoj en Esperanto, mi ne havas la eblecon informiĝi. Tial mi sube notos nur kelkajn proprajn rimarkojn de simpla esperantisto.

Certe la problemo interesis jam de komence la esperantistojn, kiuj devis uzi proprajn nomojn skribe kaj buŝe. Prave *Lanti* kaj aliaj bedaŭris, ke PV (1934) ne enhavis proprajn nomojn. Al tiu ĉi informo, *Waringhien* aldonas: "*Grosjean-Maupin* opiniis, ke tio estas tro malfacila demando, kiun nur la estonteco solvos, se entute". Tamen la kreskanta literaturo, la oftigo de aviadilaj vojaĝoj kaj la densigo de la internaciaj rilatoj faras tre dezirinda ian solvon, eĉ provizoran kaj neperfektan (samloke, p.XVI-XVII).

Ĉar *Waringhien* aldonis la personnomojn en PIV, li serioze kaj tre kompetente konsideris la problemon. Tamen, miaopinie, intertempe en la ĝenerala kulturo aperis preskaŭ senescepta solvo: oni uzas la originan nacian formon kaj inter krampoj oni aldonas la prononcon. Tiu ĉi solvo troveblas en ĉiuj novaj vortaroj kaj enciklopedioj, kun la mencio, ke la prononco estas skribita en fonetika internacia alfabeto.